Izidoro trovis oportuna tusi, brui, interrompi la iradon de la memorajaĵoj. Urgis fiksi la daton de la edziĝo. La fianĉo forveturos post kelkaj tagoj, por vojaĝo daŭranta ok aŭ naŭ monatojn.

Trad. C. C.

(Daŭrigota)



Nia eminenta samideano, kortega konsilisto Hugo Steiner, kiu antaŭ nelonge festis sian 85-an naskiĝtagon, aperas apud busto de Zamenhof.

Bona maniero honorigi tiun plej sindonan batalanton estas kontribui al lia grava kreitaĵo — la fama Internacia Esperanto-Muzeo de Vieno.

RECENZO

Sofoklo — REĜO EDIPO KAJ ANTIGONA — Enkonduko, elgrekigo kaj notoj de Douglas B. Gregor — Kovrilo de John Hartley — STAFETO: Belliteratura Eldonserio, 16 — J. Régulo, Eldonisto, La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj, 1960 — 22cm x 16cm — 216 paĝoj — Prezo ĉe BEL: Cr\$ 2.400,00.

La greka tragedio estas esenca literaturo por la formado de altnivela kulturo. Tial ni ne povas ne agnoski la valoron de la ĵus eldonita libro. Sofoklo, vivinta en la kvara jarcento A. K., estas pli fidinda ol aliaj verkistoj el lia tempo, kiel Eskilo, pli maljuna, kaj Eŭripido, pli juna. La direkton, kiun li donis al siaj historioj estas universale akceptataj kiel pravaj, kio ne okazas ĉe la aliaj verkistoj, kies verkojn oni juĝas fantaziplenaj. La tradukinto plene pravis elektante el la greka literaturo du teatraĵojn de Sofoklo, kiuj temas pri Edipo kaj lia filino Antigona. Profunde majstrante la grekan literaturon ne nur la Sofoklajn tekstojn li konsultis por la faro de tiu belega laboro: liaj propraj konoj kaj alies eseoj helpis lin. La rezulto estas ke li donas al la esperanta literaturo kompletan verkon, tiel distran kiel instruon.

Tre oportunaj ŝajnas al ni la enkondukoj, kiujn li metis antaŭ ĉiu el la teatraĵoj. La grekaj tragedioj estas tiel interplektitaj je intrigoj ke por bone kompreni ian tekston estas necese reveni al aliaj generacioj, ĉar tie kuŝas la ekstremo de la radiko kiu subtenas la genealogion. Ĉion la tradukinto zorge klarigas pere de la enkondukoj kaj de piednotoj kaj antaŭparolo. Sen ili, ni kredas, la libro ne estus kompleta.

Tre impresas la leganton la fideleco kun kiu la tradukinto prilaboris la originalon, tradukinte verse la teatraĵojn laŭ samaj taktoj, tiamaniere konservante en la traduko la belecon de la originalo. Ni sentas, kiel li mem klarigas, la diferencon inter la paroloj, ekzemple kiam temas pri simpla dialogo aŭ pri kanto de la horo. Por tio Sofoklo ŝanĝis la taktojn de la versoj, kaj je tio Douglas Gregor lin akompanis. La traduko samrimas kiel la originala teksto.

ANTIGONA estas daŭrigo de REĜO EDIPO kaj inter ambaŭ situas alia teatraĵo de Sofoklo, EDIPO EN KOLONO, kiu, bedaŭrinde, ne aperas en la libro. Kvankam tio plialtigus la prezon de la eldonado, ni opinias, ke la esperantlingvanoj estus pli dankemaj se ili povus havi la trilogion en unu volumo. Restas tamen la espero, ke Douglas Gregor daŭrigos tiun laŭdindan laboron por la riĉigo de nia literaturo kaj la disvastigo de la greka.

Tiu libro, kiu pligrandigas la Belliteraturan Eldonserion pravigas la aserton, ke J. Régulo, kiel eldonisto, estas garantiaĵo por la suspektema leganto. Lia nomo kaj la insigno STAFETO stampitaj sur la libro atestas ĝian kvaliton. La eldoninto kaj la tradukinto estas ambaŭ gratulindaj.

J. V. M.

Eli Urbanová — NUR TRI KOLOROJN — Prezento de Julio Baghy — Ilustraĵoj de Karel Oberthor — STAFETO: Beletraj Kajeroj, 3 — J. Régulo, Eldonisto, La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj, 1960 — 19cm x 12cm — 140 paĝoj — portreto de la aŭtorino — Prezo ĉe BEL: Cr\$ 1.400,00.

Recenzi libron ne estas facila tasko, precipe kiam la recenziĝo ne havas sufiĉajn konojn pri la verkinto kun kiu li kontaktigas la unuan fojon. Recenzo plej ofte estas farata surbaze de aliaj verkoj, kiuj povas difini la karakterajn trajtojn de la aŭtoro, sen kio ni riskus fari neĵustan kritikon.

Tio povas alĝustigi al Eli Urbanová, ĉar ni tre malmulte scias pri ŝi. Tamen, post la tralegado de ŝia libro ni tre simpatiis al la ĉeĥa poetino, precipe pro la simpleco per kiu ŝi esprimas sian penson. Tute libera, sen falsaj konvencioj aŭ metaforoj, sen timo al kritiko, ŝi malkaŝas intimajn erojn de sia vivo, skizante simpatian aŭtoportreton.

La libro dividiĝas en multaj partoj kaj en ĝia tuteco ni vidis ne "nur tri kolorojn" sed multajn kolorojn, kaj ĉiuj estas viglaj, helaj kaj varmaj. Ni ne vidis la nigran pri kiu parolas la poetino malpli pesimisme ol modeste.

La poeziaĵoj (kelkaj el ili premiitaj en beletraj konkursoj) ne estas revoluciaj nek supernaturaj: ili estas nature be-

BIBLIOGRAFIO

A Teacher's Story — An Autobiography by Jehiel Shotwell Davis — 292 p. (13, 5 x 19,5 cm), bindita. 1961 — The Christopher Publishing House, Boston, USA.

Aŭtobiografio de Jehiel Davis, naskita en 1892 en la ŝtato Michigan.

La 14-a ĉapitro de tiu angla verko estas tute pri Esperanto kaj enhavas la Esperantan Gramatikon.

* * *

Esperanto, as a literary language by William Auld M. A.

Verko publikigita okaze de la 75-a datrevena jaro de la unua libro pri la Internacia Lingvo.

* * *

Kling-Klang — Latenta nombrofenomenoj en la Sankta Skribo I. 16 p. 1962. Eld. Nova Mondo, Stockholm, Svedujo, — "Ĉiu vorto en la Biblio havas propran nombrovaloron. Do, se mi diras "Dio" (Elohim), tiam mi samtempe povas pensi ankaŭ pri Lia nombrovaloro, ĉar Dio = Elchim = E-l-h-o-m = 1 + 30 + 5 + + 40 = 86."

Ferdo Skrljac — Basnice za Male i odrasle. Fabletoj por etuloj kaj plenkreskuloj — El la kroata trad. Prof. Josip Velebit. Ilustraĵoj de Ivan Večenaj.

"Lacerto surgrimpi ŝtonegon kaj tiel nun estas pli alta ol multaj lacertoj. Tiam flatemuloj volante ĝin flati, malfiere falis al ĝiaj piedoj."

Ole Nederland — Tom kaj Tina en la flugmaŝino — Dua parto. 70 p. Dansk Esperanto-Förlag — Dana Esperanto-Eldonejo. Tre interesa Internacia Esperanto-lernolibro por infanoj, kontrolita de la Literatura Komitato.

DANIEL QUARELLO — *Sintesis de Esperanto para principiantes* — 2.^a eldono. 118 p. Quarello K-io — C.C.47, Suc. 13, B. Buenos Aires.

Nova metodo originala, praktika, por aŭtodidaktaj, kaj ankaŭ por E.-kursoj.

* * *

La kultura vivo de la ĉinaj laboristoj kaj oficistoj — kompilita de la Tutĉinia Federacio de Sindikatoj. Multilustrita.

* * *

Karpetoj transsaltis la Drakpordon. Bildoj de Jang Sanzi kaj Ding Jonklin. Teksto de Gin gin. Trad. F. H. Multilustrita.

* * *

Pitoreskaĵoj de Pekino — Interesa dekduo da poŝtkartoj kun vidaĵoj de Pekino (parkoj, templo, halo, lago, kioskoj k.a.)

* * *

L'Espéranto, langue littéraire, par William Auld, M.A.

Une étude. Editée à l'occasion du 75-ème anniversaire de la publication du livre "Internacia Lingvo" — Londres 1962. Tradukis el la Esperanta originalo Suzanne Minaulti. U.E.A. Centro de Esploro kaj Dokumentado, Londono.

Tran Do — Djen Bjen Fu — Rakonto. Fremdlingva Eldonejo Hanojo Vjetnamio. 1962 — 89 p. kaj mapoj de la regiono. Trad. Nguyen Minh Kinh, Nguyen Minh Tung, Fam Kuand Dan.

La aŭtoro, oficiro, batalanto de Djen Bjen Fu, rakontas, per simpla, alloga stilo, interesajn travivaĵojn.

laj, spontaneaj, pentritaj per farboj el la koro, intimaj kaj plenaj de amo kaj pasio.

La aspekto de la libro estas ŝatinda, laŭ enhavo kaj prezento, por kiu kontribuis la erotikaj desegnaĵoj de Karel Oberthor.

J. V. M.

FARMÁCIA ESPERANTO

Estas la nomo de apoteko de nia samideano Daniel Abbá, en São Martinho, Paraná.

OS PAPAS SÓBRE O ESPERANTO

PIO X:

"Reconheço a utilidade do Esperanto para conservar a unidade entre os católicos do mundo."

Pio X muitas vèzes deu parte do interêsse que tomava pelo Esperanto a Mons. Giambene, membro da Congregação do Santo Officio e um dos pioneiros do Esperanto na Itália.

Em 1905, aceitou graciosamente a homenagem da revista *Espero Katolika* e leu, perante Mons. Giambene, uma poesia escrita em Esperanto pelo P. Dombrowski.

Em setembro de 1906, êle mandava a sua bênção ao Congresso Esperantista de Genebra; depois aos de Cambridge e de Barcelona. Pormenor interessante: o telegrama era mandado do Vaticano em Esperanto.

Em 4 de abril de 1908, recebia em audiência particular Fr. Isidore, delegado do Governo Belga ao Congresso dos Cegos em Nápoles. Espontaneamente, o Santo Padre felicitou Fr. Isidore pela decisão tomada pelo Congresso de favorecer o estudo do Esperanto nos Institutos de cegos. Depois de lhe ter por isso testemunhado tôda a sua alegria, Pio X disse-lhe: "O Esperanto tem um grande futuro diante de si."

BENTO XV:

(Como Arcebispo de Bolonha e Cardial Della Chiesa):

"Desejo que entre os meus padres se achem alguns que ensinem o Esperanto."

PIO XI:

(Carta dirigida à Liga Italiana dos Esperantistas Católicos):

"É com prazer que informo V. Revma. do bom acolhimento que o Santo Padre reservou aos documentos que lhe enviastes mostrando os esforços feitos com o fim de empregar a língua Esperanto para a propagação do Evangelho.

"Sua Santidade vos agradece êsse testemunho de respeito filial, e, encorajando êsses esforços dignos de louvores, como penhor de favores divinos vos concede a bênção apostólica."

PIO XII:

Ao levar a bênção do Pontífice seu antecessor ao Congresso Internacional

de Esperantistas Católicos, reunido em Roma, disse o então Cardial Pacelli, na sessão inaugural realizada sob a sua presidência:

"Auguro ao Esperanto um papel, no futuro da Civilização, semelhante ao do Latim na Idade Média. Faço votos para que a língua auxiliar internacional seja, como o foi, por muitos séculos, a língua do Lácio, um instrumento aglutinante e pacificador dos povos."

Liga Brasileira de Esperanto

Assembléia de 27 de Abril de 1963

Em 27 de Abril de 1963, às 16,30, na sede social, reuniu-se em sessão ordinária a Assembléia Geral da Liga Brasileira de Esperanto, convocada na conformidade dos Estatutos, sob a presidência do Prof. Dr. Carlos Domingues. Presidente da Liga, e com a presença da quase totalidade dos Delegados e de grande número de membros.

Fizeram parte da mesa o Dr. Luis Alberto Brandão Martins, Segundo-Secretário, e D. Irani Baggi de Araújo, Tesoureira. O primeiro leu a ata da sessão anterior e o Relatório da Diretoria referente ao ano próximo findo, e a segunda procedeu à leitura do Balancete relativo ao mesmo período. Todos êsses documentos, submetidos a discussão e votação, foram unânimemente aprovados.

Ainda na ordem do dia realizou-se a eleição para o cargo de Secretário-Geral, anteriormente ocupado pelo Prof. Dr. L. C. Porto Carreiro Neto, que renunciou por motivo de doença. Para substituí-lo foi eleito o 1.º Secretário, Sr. Francisco Ferreira da Costa Filho, substituído pelo 2.º Secretário, Dr. Luis Alberto Brandão Martins, e para ocupar o cargo de 2.º Secretário foi eleito o Dr. Floriano Pessoa.

O Presidente, que exprimira o profundo agradecimento da Liga ao Prof. Dr. Porto Carreiro Neto pelos relevantes serviços que prestou durante longos anos, saudou os recém-eleitos manifestando-lhes a confiança da instituição e declarando-os empossados.

APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

KONSILIGO DE LA RATOJ

O PASSADO

Monteiro Lobato

A terra desapareceu a meus olhos; por mais que alongue a vista, sòmente descubro mar e céu.

Indizível melancolia se apodera de mim: parece-me que já não pertence ao mundo que habitava, como não vivo no presente; e triste de mais para sonhar com o futuro, eu quero ao menos recordar o passado.

O momento é oportuno: eu tenho a saudade no coração, e a saudade pertence tanto ao passado, como a esperança é tóda inteira do porvir.

Quero lembrar-me de meus belos anos já vividos! O passado é um lago mágico de gozos deleitosos, quando a consciência não tem de que acusar o homem, e os remorsos não pesam sobre o coração. E em momentos de doce melancolia a alma deixa-se levar nas asas da memória a êsses saudosos espaços decorridos, e arroja-se no formoso lago, onde se banha toda esquecida dos pezares do presente, e ainda mesmo dos temores do futuro.

Joaquim Manuel de Macedo

Dêste eminente escritor brasileiro, nascido em 1820 e falecido em 1882, é o presente trecho, cuja tradução virá no número seguinte.

EZOPA SAĜO

77 fábulas do imortal fabulista grego Esopo.

Em magnífica tradução do eminente poeta e acadêmico K. Kalocsay.

Volume encadernado Cr\$ 2.500,00

Kato nomata Flaro-Subtila, komencis fari tiel grandan buĉadon ĉe la ratoj en malnova domo, ke la postvivantoj, senkuraĝaj eliri el siaj kaŝejoj, estus baldaŭ malsatemortontaj.

La okazaĵo montriĝis tre serioza, kaj ili decidis fari kunsidon por ekzameni la aferon.

Por tio, ili profitis iun nokton, kiam la kato miaŭadis sur la tegmento, farante sonetojn al la luno.

— Mi opinias — diris unu el la ratoj — ke la rimedo defendi nin kontraŭ Flaro-Subtila konsistas en ligi tintilon ĉe ĝia kolo. Kiam ĝi proksimiĝos, la tintilo tuj sciigos nin pri tio, kaj ni foriros oportune.

Aplaŭdoj, bravokrioj salutis la luman ideon. La projekto estis entuziasmege aprobita. Nur unu voĉdono estis kontraŭa, tiu de obstinega rato, kiu petis la parolon kaj diris:

— Ĉio estas plene korekta, sendifekta. Sed kiu ŝnurligos la tintilon ĉe la kolo de Flaro-Subtila?

Regis tomba silento. Poste, unu senkulpigis sin, ĉar ĝi ne scias nodi. Alia, ĉar ĝi ne estas stultulo. Aliaj, ĉar mankas al ili kuraĝo. Kaj la kunsido fermiĝis, plene konsterniĝe.

Moraleco: Diri estas facile; sed fari jen la malfacila afero!

Trad. C. C.

DONACO

Nia sindona samideano kaj Membro-Subtenanto S-ro Getúlio Soares de Araújo donacis al B.E.L. por ĝia sidejo bonan ŝrankon, kiu pligrandigas nian meblaron, kiu, kvankam jam granda, devas konstante kreski por teni nian oficejan kaj librejan materialon. Plie li donacis paperujojn k.s.

Ni kore dankas la donacinton, al kiu ni ŝuldas tiom da bonaj servoj.

LA PREDIKO

I — Mi entreprenis grandajn farojn: mi aranĝis al mi La Grandan Konkurson, kaj plantis en ĝi miajn esperojn. 2 Mi aranĝis al mi albumojn, por enmeti en ilin la ricevitaĵojn. 3 Mi kolektis al mi esperantaĵojn el multaj landoj; mi havigis al mi plezurojn de esperantidoj. 4 Kaj mi pligrandigis kaj plimultigis pli ol ĉiuj, kiuj estis antaŭ mi en Samideanio, kaj miaj esperantaĵoj restis kun mi. 5 Kaj ĉion, kion mi postulis de la samideanoj, ili ne rifuzis al mi. 6 Mi fortenis mian koron de nenia ĝojo, ĉar mia koro ĝojis pri ĉiuj miaj partoprenintoj; kaj ĉi tio estis mia rekompenco por ĉiuj miaj laboroj. 7 Kaj mi ekrigardis ĉiujn miajn farojn, kiujn faris miaj manoj; kaj jen ĉio estas vantaĵo, kaj nenia profito estas de ili sub la verda stelo.

II — Kaj mi returniĝis kaj mi vidis ĉiujn premiojn, kiuj estas disdonitaj de La Granda Konkursulo; kaj jen estas larmo de nepremiitoj; kaj ne ekzistas por ili konsolanto. 2 Mi vidis, ankaŭ ke ĉia laboro de la partoprenintoj estas nur konkursado de unu kontraŭ alia; kaj ĉi tio estas vantaĵo kaj vantaĵo. 3 Pli bona estas komencanto helpema, ol akademiano kabeiginta...

III — Gardu vian skribilon, kiam vi uzas ĝin en Samideanio, kaj estu preta pli por legado, ol por oferdonado de malsaĝuloj. 2 Kiam vi faros promeson al Konkursulo, ne prokrastu ĝin plenumi. 3 Pli bone estas, ke vi ne faru promeson, ol fari promeson kaj ne plenumi. 4 Kiu amas bildkartojn, tiu ne satigas per bildkarto; kaj kiu amas poŝmarkojn, al tiu ili ne donos utilon. 5

Ju pli multa estas la havo, des pli multaj estas ĝiaj konsumantoj (korespondantoj); kaj kian profiton havas ĝia mastro, krom vidi ilin per siaj okuloj?

IV — Turmentan malbonon mi vidis sub la verda stelo; esperantaĵojn konservatajn por la malutilo de la movado. 2 Kaj pereas ĉi tiu riĉeco en malfavoraj cirkonstancoj: naskiĝas denaska esperantisto, kaj li nenion komunan havos kun nia afero. 3 Jen kion mi vidis: ke estas bone kaj bele konkursi, kaj ĝui plezurojn de ĉiuj siaj laboroj, kiujn laboras la samideanoj sub la verda stelo.


V — Se iu samideano naskigus cent infanojn, sed ne instruus al ili Esperanton, tiam mi dirus: Pli feliĉa ol li estas abortito. 2 Eĉ la verdan stelon li ne vidis kaj ne konis. 3 Ĉiuj laboroj de korespondanto estas por liaj tirkesto, kaj tamen lia poŝkesto ne estas satigebla.

VI — Aliflanke mi vidis sub la verda stelo, ke ne de rapiduloj dependas la sukceso, kaj ne la talentuloj havas riĉecon, kaj ne de la kompetentuloj oni trovas aprobon.

VII — Kial vi ne elsendis vian konkursaron aviadile? Ĉar post longa tempo mi ĝin ricevas. 2 Donu al mi parton de viaj esperantaĵoj, ĉar vi ne scias, ĉu estos malfeliĉo por ili.

VIII — Penus la Konkursa Predikanto trovi agrablajn parolojn, kaj li skribis vortojn de vero. 2 Kaj krom tio, mia kara partopreninto, akceptu ĉi mian informilon, ke se mi volus verki multajn librojn, ne estus fino, kaj multe legi lacigas la korpon.

IX — Ni aŭskultu la finon de ĉio: timu la Konkursulon, kaj plenumu liajn dezirojn, ĉar tio estas ĉio por la samideano. 2 Ĉar ĉiujn senditaĵojn la Kon-



Ekspozicio en Chaperó — Santa Catarina

15/12/1962

kursulo venigis al juĝo, ĉu ĝi estis bona aŭ malbona.

(paĝo mediume ricevita dum la kaŝita seanco en la nokto de la cent-tria naskiĝa datreveno de nia kara majstro L. L. Zamenhof — 15-XII — 62).

LA KONKURSULO

SE VI NE ŜATAS PREDIKE, VI ŜATAS STATISTIKE

LANDOJ	SENDINTOJ	KOVERTOJ	POŝTMARKOJ	BILDKARTOJ	ETIKEDOJ
Anglujo	5	5	75	21	—
Argentino	1	1	460	3	10
Aŭstralio	2	2	5	10	—
Aŭstrujo	5	5	61	22	—
Belgujo	13	15	838	8	209
Brazilo	5	5	108	21	—
Bulgarujo	23	58	301	242	30
Ĉeĥoslovakujo	55	74	916	367	1 053
Ĉinujo	4	4	162	4	—
Danlando	2	2	33	5	—
Finnlando	2	2	130	5	—
Francujo	10	11	377	32	—
Germanujo	32	54	1 291	182	125
Gvatemalo	1	1	5	55	—
Hispanujo	4	5	134	3	3
Hungarujo	24	47	806	229	244
Indonezio	1	1	3	3	—
Islando	1	1	45	9	—
Italujo	16	26	526	144	60
Jugoslavio	14	19	502	50	—
Kanado	3	4	83	11	—
Madagaskaro	1	1	52	—	3
Nederlando	15	21	652	48	184
Nov-Zelando	1	1	101	—	—
Pollando	41	67	1 564	433	146
Rumanujo	1	1	3	5	—
Skotlando	1	1	51	6	—
Sovetunio	108	158	1 439	1 220	1 544
Svedujo	9	9	400	43	53
Svislando	2	2	43	3	—
Urugvajo	1	1	34	3	3
Usono	3	5	83	3	55
32	406	689	11 283	3 190	3 722

LA STATISTIKO

Ho, karaj fratoj, kie vi estas, kion vi faras? (por landoj ne partoprenintaj!)

La nuna statistiko nuligas tiun prezentitan en decembro; ĉi tiu havas la aldonon de la Post-Konkurso, la 1-an de marto 1963.

Mi ne partoprenis la lastan mondmiliton, do ne mi dividis Germanion.

Ne ĉiam la materialo estas DE tiu lando, sed sendita EL. Ne ĉiam estas bk, sed ankaŭ albumoj, libroj, turismaj prospektoj, diskokartoj...

La plej riĉaj kovertoj alvenis el Hungario, Bulgario kaj Ĉeĥoslovakio. La plej belaj albumoj estis el Pekino, Moskvo, Leningrado, Krakovo.

La plej granda parto de la partoprenintoj el Sovetio fakte estas el Litovio kaj Estonio.

La nombro de la partoprenintoj ne estas granda, sed mi neniam suspektis, ke oni sendus tiom multe da materialo. Alvenis dikaj pakadoj kiuj "rompis" mian poŝtkeston.

La tago de la plej riĉa rikolto estis tiu de la 13-a de decembro. Tiam satiĝis la poŝtkesto... ĉar estis 42 kovertoj

kaj 156 bk, i. a. (mi iras ĉiutage al la poŝto!)

Daŭre mi ricevadas senditaĵojn por la konkurso... sed kelkaj estas elsenditaj post la 15-a de decembro...

Mi esprimas mian koran dankon al la revuoj, kiuj min helpis per la anoncoj: Brazila Esperantisto, Heroldo, Espero Katolika, El Popola Ĉinio, Paco (ĉina) kaj Sennaciulo. Al Brazila Esperantisto mi ankaŭ dankas la donacon de dek libroj "Rui Barbosa", helpe al la konkurso. Mi dissendis 315 ekzemplerojn de Brazila Esperantisto, sed ŝajne multaj ekzempleroj perdis survoje...

Por la 170 libroj konkursis 2 943 n-roj



La Direktorino de Normala Lernejo "Bom Pastor" Chapecó, Santa Catarina, rigardas la Ekspozicion

kaj por la 35 abonoj 604. Mi aldonis 92 librojn por la konkurso mem, kaj pliajn 50 por la Post-Konkurso, do entute 347 premiojn mi donis (jen kial mi nomis ĝin LA GRANDA KONKURSO).

Per cirkulero mi informis ĉiujn pri la premiitoj, ties plena adreso, ties premioj. La librojn ekspedis (rekomendite) la eldonejoj mem.

LA EKSPOZICIO

Tiun materialon mi kolektis por grandioza ekspozicio (ne por mia privata kolekto, kiel kelkaj opiniis!).

La ekspozicio estis inaŭgurita la 15-an de decembro, fare de oficiala reprezentanto de la urbestro. Ĉeestis aŭtoritatoj, precipe lernejoj, lernantaro kaj granda publiko. Parolado pri Esperanto, pri Zamenhof, klarigis la okazintaĵojn kaj la ekspoziciitan materialon. Je la malfermo oni aŭdis la marŝon de la ekspozicio de poŝtmarkoj de Praha (1962) — sur diskokarto — kaj la efektis grandioza, solena.

Oni vidis bildkartojn, poŝtmarkojn, alumet-etikedojn (novaĵo ĉe ni), E-librojn kaj revuojn. Kio plej allogis la publikon estis la diskokartoj el Ĉeĥoslovakio. Tiujn diskojn oni povis aŭdi en la ekspoziciejo mem.

Oni multe rigardis la fotojn de la sovetaj kosmonaŭtoj — mi kredas, ke mi ricevis plenan galerion — ĉar pri ili mi ricevis 184 fotojn. La plej grandaj standoj estis tiuj de Sovetunio, Pollando, Ĉeĥoslovakio, ktp, laŭ la statistiko. Mi povas fari grandegan ekspozicion nur per materialo ricevita el Sovetio. Manĉis loko. Estis nur 64 tabloj... Por la bildkartoj mi konstruis specialan montilon je 40 metroj longan kaj 1,5 altan. La cetera materialo estis en tri kestoj, en la ekspozicio, kaj tiuj mirigis multajn, kiuj ne kredis, ke ili estis plenaj nur de korespondadoj, ... kaj metis la manojn por certigi pri la vero. Grandega efekto!

Kelkaj vizitintoj revenis plurfoje, ĉar ili revidis siajn naskiĝajn landojn — rusoj, poloj, germanoj, aŭstroj...

Por la propagando zorgis la lernantaro. Oni propagandis per la loka radio, en la kinejo, kaj dum la unuaj tagoj ankaŭ per laŭparolilo surstrata. Okazis intervjuo en la ekspoziciejo mem kun la organizinto kaj kun ĉeestantoj, kiuj gavis antaŭ tiom da materialo, kaj havis nur laŭdajn vortojn. La radio-parolisto proklamis: "okazas la plej granda kultura okazintaĵo en nia urbo, la ekspozicio de ... ĉio ricevita de unu sola persono, per unu sola lingvo, la internacia lingvo Esperanto. Leteroj el pli ol 30 landoj, el ĉiuj partoj de la mondo..."

Renkontiĝo de instruistoj kaj lernejaraj aŭtoritatoj okazis dum tiuj tagoj kaj ili ĉiuj vizitis la ekspozicion. Pri tiu valoro publiko mi neniam kalkulis. La ekspozicio do havis efekton regionan.

Kaj en 1963, en mia lernejo, estas Konstanta Ekspozicio, ĉiusemajne per renovigita materialo. Neniu lernanto forgesas rigardi ĝin...

Kaj ĝen kiel miloj da personoj sciiĝis pri nia afero, per nerekta propagando, ĉar mi montris la praktikan uzon de la lingvo. Mi kredas, ke tiu ĉi estas la plej bona propagandilo: la uzado de la lingvo.

(por pliaj informoj skribu al Gersi Alfredo Bays, Caixa Postal 49, CHAPECÓ, Santa Catarina, Brasil).

La 3-an de marto 1963

CONVENÇÃO — KONVENCIO

Em 1905 realizou-se o 1.º Congresso Universal de Esperanto (*Universala Kongreso de Esperanto*) em *Boulogne-sur-Mer*, França, com a presença do dr. L. Zamenhof.

Após dois anos, em 1907, os esperantistas brasileiros tiveram seu 1.º Congresso Brasileiro de Esperanto, no Rio de Janeiro, então capital do Brasil.

Em seguida, com intervalos de poucos anos entre um e outro, já tivemos mais 17 Congressos Brasileiros de Esperanto, em vários Estados.

Com o progresso da propaganda esperantista, nos intervalos dos Congressos Brasileiros de Esperanto (*Brazilaj Kongresoj de Esperanto*) alguns Estados organizaram seus congressos de Esperanto estaduais (Minas Gerais, Rio de Janeiro, Rio Grande do Norte, São Paulo, etc.)

A esses pequenos congressos ou congressos regionais realizados a partir de 1946 deram os seus organizadores o nome de *Convenção*, traduzido para o Esperanto como *Konvencio*.

Tais reuniões ou congressinhos (*Kunvenoj, Kongresetoj*) não são, porém, *convenções* (*konvencioj*); a denominação é usada imprópriamente e sem necessidade nesses casos.

Vejamos a significação justa de alguns desses termos de Esperanto:

Kongreso — Solena kunveno de samideanoj aŭ samprofesiaĵoj, ĉu nacia, ĉu internacia (*congrès*).

Konvencio — (hist.) Fama Kunveno dum la Franca Revolucio (*convention*).

(*Emile Boirac* — *Plena Vortaro de Esperanto* — *Esperanta kaj Esperanto-Franca*).

Kongreso — : Solena kunveno de samcelanoj aŭ samprofesiaĵoj el unu aŭ el diversaj landoj por diskuti komunajn literaturajn, sciencajn, politikajn, ekonomiajn demandojn.

Konvencio — : 1 — Interregna, internacia kontrakto. 2 — Tio, kio estas starigita per esprimita aŭ neesprimita konsento inter la homoj. 3 — Nacia eksterordinara konstituciiga kunveno.

(*Plena Vortaro de S.A.T.*)

Konvencio — Interkonsento, kontrakto, precipe inter regnoj: *literatura konvencio, gardanta la aŭtorajn rajtojn*.

(*Kabe* — *Vortaro de Esperanto*).

Vejamos agora em autores na língua portuguesa:

Convenção — Latim — *Conventio, conventionem*.

1 — Acôrdo de vontades feito verbalmente ou por escrito, entre duas ou mais pessoas; convênio, ajuste.

2 — Na linguagem vulgar, o que está geralmente admitido ou tácitamente convencionado: *as convenções sociais*.

3 — Reunião nacional para modificar as instituições políticas.

4 — Pacto entre os partidos políticos beligerantes.

(*Caldas Aulete, Dicionário Contemporâneo da Língua Portuguesa*. Edição brasileira 1958.)

Convenção é o acôrdo, não de vontades ou de impulsos propriamente, mas de razão, de direito ou de interesses a que se submetem afinal partes que não puderam dirimir de outro modo a contenda ou a questão debatida. Uma convenção de alta categoria chama-se *tratado*, e só pode ser celebrado entre nações.

(*Rocha Pombo, Dicionário de sinônimos da língua portuguesa*).

C. C.

Edições de

LA SPIRIT-SCIENCA INSTITUTO DE MARTINUS

Copenhague, Dinamarca

	Cr\$
<i>Informilo pri la spirita scienco de Martinus</i>	500,00
<i>Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio</i>	1.200,00
<i>Folioj el la bildolibro de Dio</i>	1.200,00
<i>La homaro kaj la mondbildo</i>	1.200,00
<i>La ideala nutraĵo</i>	1.200,00
<i>La idolo plej longe vivanta</i>	1.200,00
<i>Internacia mondregno kreiĝanta</i>	1.200,00
<i>Kio estas la vero</i>	1.200,00
<i>Pasko</i>	1.200,00
<i>Logiko</i>	4.200,00
Coleção completa	12.000,00

FUNDO DE EDIÇÕES 48-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Publicamos uma nova lista de adesões ao nosso Plano, registrando com prazer que os nossos samideanos compreenderam perfeitamente a parte decisiva que lhes cabe no empreendimento.

Esperamos continuar a receber novas manifestações de apoio e ficamos à disposição de todos para os esclarecimentos preciosos.

As abreviaturas na lista significam: A. — aquisição (de um ou mais exemplares); D. — donativo; E. — empréstimo; p. — prestações.

Manoel C. Carneiro, Pelotas, RS — A.1
Sóstenes Moreira da Costa, Volta Redonda, R.J. — A.1. D. 1.000,00.

Joaquim do Couto, Niterói — A.1.

Esperantista Societo de Porto Alegre.
— A.5. Guia 30, Dicionários 50. E. 10.000,00.

Alberto FLORES, Volta Redonda RJ — A.1.

Clara Alvina Zuhlke Juruena, Rio de Janeiro — A.1 — D. 20.000,00.

Débora do Amaral Malheiro, Rio de Janeiro — D. 5.000,00.

Maria do Amaral Malheiro, Rio de Janeiro — D. 5.000,00.

Oswaldo Masini, São Paulo — D. 10.000,00.

Carlos de Matos, Rio de Janeiro — A.1.

Aloysio C. S. Melo, Goiânia — A.1. D. 10.000,00.

Frederico Otto Mog, Porto Alegre — A.1.

Nina Fonseca Parreira, Monte Alegre de Minas — M.G. — A.1.

Florianio Negreiros de Vasconcelos Pessoa, Rio de Janeiro — E. 5.000,00.

Carlos Rezende, Belo Horizonte — A.3. — D. 5.000,00.

Benedicto Silva, Votuporanga, SP — D. 3.200,00.

Nair de Melo Vanucci, Moji das Cruzes, SP — D. 500,00.

Deoclecio Lima Verde, Limoeiro do Norte C.E. A.2.

Jatir Gonçalves Vieira, São João da Bela Vista, SP — D. 1.000,00.

C. A. Wutke, Uberlândia — A.5.

Alberto Gustavo Ziehe, Petrópolis, RJ — A.1.

Registara Delegito de Brazilo

Plenumante peton de Brazila Esperanto-Ligo la Ministerio por Eksterlandaj Aferoj nomis oficialan Delegiton de Brazilo ĉe la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio Bulgarujo, S-ron Ambasadorejan Konsiliston Paulo Oliveira Versiani Cunha.

Ni vidas kun plezuro, ke nia lando, kiu sin reprezentis en preskaŭ ĉiuj Universalaj Kongresoj, ĝis nun okazintaj, estos ankaŭ reprezentata en la venonta, kiu efektiviĝos de la 4-a ĝis la 11-a de Aŭgusto.

PENSO

Se la romanoj estus devintaj lerni la latinan lingvon, ili neniam estus havintaj tempon por konkeri la mondon.

H. Heine (1797-1856)
(El "la Praktiko", dec. 1962)

NASKIĜO

Rikardo Āngelo estas la esperantista nomo de la unuanaskita filo de geedzoj Adolfina kaj Gersi Alfredo Bays, naskita la 3-an de julio en Chapeco, ŝtato Santa Catarina. Ni kore gratulas nian sindonan samideanon kaj karan amikon Bays kaj lian edzinon kun koraj bondeziroj por la feliĉo de Rikardo Āngelo.

SUBVENCIO

La budĝeto por 1963 de ŝtato Guanabara donas subvencion de Cr\$ 250.000,00 al Brazila Esperanto-Ligo.

La subvencio rezultis de propono de S-ro Deputito Naldir Laranjeira.

PAGU FRUE VIAN KOTIZON KAJ VARBU NOVAJN MEMBROJN

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO"

FONDITA EN LA 29-a DE JUNIO 1906

LA LOKA GRUPO DE LA URBO RIO DE JANEIRO — PRAÇA DA REPÚBLICA, 54 — TEL.: 42-4357 — MALFERMITA EN LA LABORTAGOJ DE LA 8-a ĜIS LA 18-a KUNVENOJ: SABATE DE LA 14-a ĜIS LA 18-a

La 29-an de Junio oni okazigis memorgan kunvenon por festi la datrevenon de nia veterana klubo. Estis legitaj al la ĉeestantoj diversajn historiajn dokumentojn pri la fondo de la klubo kaj montritaj la subskribon de kelkaj pioniroj.

En la dua parto de la kunveno, honore al la famkonata brazila poeto Adelmar Tavares kies morto estis okazinta antaŭ kelkaj tagoj oni deklamis versaĵojn de tiu eminenta verkisto en portugala lingvo kaj en Esperanto, laŭ traduko de J. B. Mello e Souza.

Jen la versaĵoj deklamitaj:

As penas em que hoje estou,
Disse-as ao sol, fêz-se triste;
Disse-as à noite, e chorou.
Disse-as a ti... e sorriste.

*Miajn suferojn aŭdinte,
La sun' malgojon disjetis;
Nokto ploris, kortuŝita;
Nur vi senzorge ridetis...*

Lindo luar no céu flutua...
Ao violão canto os meus fados;
Que Deus fez noites de lua
Para os que são namorados...

*Luno beligas ĉielon...
Kantante, mi tuj foriras;
Ĉar Dio kreis lunlumon
Por tiuj, kiuj sopiras...*

Tristeza, minha tristeza,
Doce amiga de meus ais;
Só de ti tenho a certeza
Que não me abandonarás...

*Malgojo, mia malgojo,
De mia kor' amikino;
Certe vi ne min forlasos,
Dum la vivo, ĝis la fino...*

Que contrastes tem a sorte!
No mundo, que ingrata lida!
— A vida, chorando a Morte;
E a Morte... rindo da Vida...

*Kapricoj de nia sorto,
Kiu nin ĉiam perfidas:
La Vivo, plendas pro Morto...
La Morto... pro Vivo ridas...*

Quanto amor me prometeste,
Nas tuas cartas... que ardor!
Depois... tudo isso esqueceste
— Coisas de cartas de amor...

*Kian amon vi promesis,
Al mi, en ĉarmaj leteroj...
Poste... ĉion vi forgesis...
Ve!... senvaloraj aferoj...*

Não sei porque, quando canto,
Por mais alegre a canção,
Tem uma gota de pranto
Que vem do meu coração.

*Mi ne scias kial, kiam
Mi kantadas kun fervoro,
Larmaj gutoj, kun la kanto,
Venas el fundo de l' koro...*

Abonu ĉinan Esperantan periodaĵon :

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata, en 40-paĝa kajero, 19 x 26 cm.

PREMIOJ:

- * Abonanto de 1964, paginta sian abonkotizon antaŭ la 1-a de feb. 1964, povos senpage ricevi belan Esperantan 1964-Kalendaron (17 X 24.5 cm., 24 p., kun 24 famaj ĉinstilaj pentraĵoj);
- * Tiu, kiu varbis du novajn abonantojn por EPC, povos senpage ricevi pecon da multkolora silka bildo "Ĉielpaca Pordego de Pekino" (26.5 X 17.5 cm.).

*

Abonu ĉe Brazilo Esperanto-Ligo
Praça da República 54, II
Rio de Janeiro
Brazilo

Abonkotizo : por 1 jaroj = Cr\$ 225,00
por 2 jaroj = Cr\$ 340,00
por 3 jaroj = Cr\$ 450,00

LIBROSERVO DE ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio
